

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Dec. 1945

33 årg. Nr 12

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Till våra prenumeranter!

Med detta nummer sluta vi den 33:e årgången av Svenska Esperanto-Tidningen. När vi för några år sedan tvingades att från 16-sidiga nummer gå ned till 8-sidiga blev arbetet på redaktionen tungt och svårt, och svårast har det varit att sköta den 33:e årgången, ty freden har uppväckt ett intresse för esperanto, vars yttringar vårt lilla format icke alls motsvarat. Det skulle därför ha varit oss kärt, om vi i dag hade kunnat meddela, att vi för den 34:e årgången skulle kunna utlova större nummer. Vi törs ingenting lova, men om esperantisterna återvända till oss som prenumeranter i samma utsträckning som förr, då skulle vi med glädje svara med en tidning, där litteratur, meddelanden, insändare, rapporter, tidsfördriv, annonser m. m. skulle trängas med varandra och icke som nu tränga ut varandra. Hjälp oss alltså att få tillbaka prenumeranterna, och vi lova, att vi skola göra vårt allra bästa. Ja, även om vi skulle tvingas hålla bara 8-sidiga nummer, skola vi i alla fall göra vårt bästa. Lita på oss. Vi lita på er.

Prenumerationspriset blir för kommande år detsamma som hittills, eller kronor 4:—. Med detta nummer följer ett inbetalningskort, och vi veta att expeditionen är mer än tacksam om detta insändes omedelbart eller åtminstone före årets slut. Om så sker, besparas expeditionen en myckenhet extra arbete och dyrbar tid, som k a n användas för andra viktiga uppgifter.

FEM SMÅ HÄFTEN.

Från England kom med första fredsposten 5 små häften. Det är 5 fackordböcker på esperanto, särtryck ur de 5 Internationella Esperantoförbundets (Internacia Esperanto Ligo, IEL:s) årsböcker, vilka tack vare de engelska esperantisternas energi regelbundet utkommit under kriget. Dessa häften bära följande titlar:

ARMEA TERMINARO de E. D. Durrant, 1940.

AERONAŬTIKA TERMINARO de E. D. Durrant, 1941.

TERMINARO POR INFANLUDOJ de la Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj, 1942.

RADIO-TERMINARO de A. Venture, 1943.

MUZIKA TERMINARO de M. C. Butler kaj F. Merrick, 1944.

Titlarna, som inte kräva någon översättning, ange innehållet, men det bör kanske påpekas, att dessa häften ingalunda äro de enda fackordböcker, som utkommit på esperanto, vi ha tvärtom en ganska rik flora fackordlistor, men vi hälsa dessa fem med särskilt intresse, därför att de representera ett nytt steg framåt av största betydelse. Tidigare fackordlistor ha utkommit sporadiskt, separat eller publicerade i tidningar, och de ha varit svåra att samla och bevara. De fem nya ha



En liten bukett nyheter från Förlaget.

Hjälp utländska esperantister!

Sista dagen för insamlingen till Polen, Tjeckoslovakiet och Holland är den 15 dec. Alla paket sändas under adress: Fru Karin Hägglund, Pontonjärgatan 35, Stockholm.

utgivits av esperantorörelsens centrala organ och under dess kontroll, de ha fått ett enhetligt format och — framför allt — de ge hopp om fortsättning.

Vi hålla nämligen dylika fackordböcker för något av det viktigaste för vårt språks utveckling mot ökad praktisk användning, och de äro utomordentliga bevis för esperantos möjligheter att smidigt anpassa sig efter det levande livets behov. Fackordlistan ger möjlighet till en detaljriktighet på sitt avgränsade område, som inte våra allmänna ordböcker kunna betungas med, och fackordlistan kan följa det nyaste nya på sitt fält med större snabbhet än den stora ordboken.

Detta att följa det nyaste nya tvingar givetvis mången gång till nya ordbildningar, och detta gäller ju inte bara för redaktören av en esperantofackordlista utan det gäller för alla som samla på facktermer och sträva att ge nyheter namn. Här kan esperanto fira verkliga triumfer tack vare sin ordbildningslära. Men denna nybildning av ord måste komma i goda händer. Först måste fackordlistans författare vara fackman på det område, som skall behandlas, så att han till fullo känner den verklighet, åt vilken ett namn skall ges. Och lika självfallet är att han också bör vara språkman, ehuru ej nödvändigtvis av den överkänsliga typen, ty hans val av namn får ej dröja, utan måste göras raskt, så att ej en praxis hinner utbilda sig som sedan befinnes lika olämplig som svår att bortarbeta.

Då nu vår internationella esperantoorganisation tagit utgivningen av fackordlistor om hand, står ju därigenom goda språkexperter blivande fack-ordboksredaktörer till tjänst, och detta skänker givetvis både dem och framför allt oss läsare en känsla av trygghet.

*

Det är kanske onödigt att utveckla, varför vi esperantister sätta så stort värde på våra fackordböcker, men några få ord om den saken torde vara på sin plats.

Esperantos uppgift är att underlätta meddelanden över språkgränserna. Vetenskapsmän och tekniker, som syssla med upptäckter och uppfinningar, affärsmän som lancera nya varor och studerande, som pröva sig fram på olika områden, skulle genom esperanto kunna komma i snabb och lätt kontakt med kolleger inom olika nationer under två förutsättningar. Den första är att de själva släppa sin misstro och sina fördomar mot esperanto. Den andra är att språket hålles redo att stå dem till tjänst.

Det är den senare förutsättningen, som vi esperantister ha att svara för, och vårt språks lika effektiva som enkla byggnad ger oss ett försteg framför varje annat språk. Men vi äro fullt medvetna om, att vårt språk liksom alla andra språk aldrig får försumma att dels ha sin ordskatt inventerad och klar för användning, dels också måste rusta sig för att svara mot både det nya i tiden och mot de i minsta detaljer inträngande studier, på vilka all värdefull utveckling vilar.

De fem små häftena kunna ju tyckas vara en obetydlighet i det stora arbete, som här antydes, men de

äro sammantagna med andra redan utgivna ett värdefullt tillskott. De äro ett steg i rätt riktning.

*

Det har varit ett särskilt nöje att få ta emot dessa fem små häften just nu, alldeles lagom till "Bokens dag". — Med Bokens dag menar esperantisten decem-berfesten, varmed höstens arbete avslutas, och som man alltid söker förlägga så nära dr Zamenhofs födelsedag, den 15 december, som förhållandena kunna medge.

Den dagen hylla vi Boken, bevararen och pånyttfödaren av esperantospråkets stora gåva, genom att allesamman köpa minst en esperantobok. Det gäller därför för alla klubbar att den dagen ordna bokförsäljning och för våra förlag att till dess ha något att bjuda oss.

Låt oss se vad vi i år ha, som kan vara särskilt lockande. Vi kunde nöja oss med att hänvisa till dagens annonser, men vi skola också göra en liten lista här.

Den nya svenska serien "Libro-Stelo" har utsänt nr 1 och 2: nr 1 **La Fino**, Bernadotte-boken, och nr 2 **La Granda Aventuro** kaj aliaj noveloj, tryckfärsk nyhet, länge väntad av författarens, dro F. Szilágyis, många vänner i och utom Sverige.

La Biblio och **Nova Testamento** ha kommit i nya sändningar.

Epokolibroserien har utökats med en ny volym "Sep vangofrapoj" av Karlo Aszlányi.

En frågesportbok har också kommit. Den heter förstås **Ĉu vi scias?**

Dr Edmond Privats klassiska verk, **Vivo de Zamenhof** finns ånyo att få.

Henrikssons lilla trevliga **Per motorciklo en tri landoj** finns också att få.

Och danskarna ha sänt över H. L. Egerrups **D:ro Dorn** och Chr. Hougards **Okazas nenio**.

Lägg detta till alla de äldre böckerna och säg sedan, om någon hos oss behöver

**gå tomhänt
från en
bokens dag!**

Resumo: De IEL ni ricevis kvin fakvortarojn, ĝojgajn atestantojn pri la evolu-kapablo de nia lingvo kaj pri ĝia uzebleco en ĉiu medio, por ĉiu formo de homa vivo. Ni precipe ĝojas ke ili venis kiel bona propagando en bona tempo al la Tago de la Libro, kiam ĉiu esperantisto provas serĉi al si novaĵojn por sia librobreto. Kun tiuj libretoj el Anglujo konkuras antaŭ la svedoj multaj grandaj aŭ malgrandaj libroj, ekde nun aŭ denove haveblaj ĉe nia reviviĝinta eldonejo.

Novajo:

SEP VANGOFRAPOJ

De Karlo Aszlányi — esperantigita el la hungara.

Tiu romano, la 7-a de la "Epoko-libroj" eldonita de The Esperanto Publishing, Londono, estas vere amuza kaj tre interesa. La juna Tenson MacPhab en ekscitita momento promesis al si mem, ke li en sep sinsekvaj tagoj traktos per vangofrapo la industri-magnaton Astor Terbanks, kiu insultis lin. Kiel li sukcesis je tio, kaj eĉ amkonkeris la filinon de Terbanks, estas la vere sprite farita intrigo de la libro. Oni ridas pro simpatio al la junulo.

Prezo: kr. 3.25 + 15 % por imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Fako 190 71 STOCKHOLM 19. Postgiro 578

Veiko Johannes. (Daŭrigo)

Rakonto de Einar Wallquist. Trad. Hj. Dahlén.

Kiam poste la norvegoj venis pli multnombre, ili ordinarie povis pli facile ol la finnoj transiri la montegaron, ĉar ili estis spertaj skikurantoj, la plimulto kutimiĝintaj al montara tereno, kaj estis bone ekipitaj. Ili tamen devis marŝi sesdek ĝis sepdek kilometrojn antaŭ ol ili niaflanke atingis laponkabanon aŭ boacgardistan dometon, kaj multaj devis postlasi portajon, skiojn kaj skibastonojn sur montega deklivo por poste malsataj travadi printempŝvelantajn riveretojn, paŝadi en senvoja tereno al plej proksima bieneto.

Unu grupo erarvagis kaj venis sur promontoron malantaŭ rapidfluaĵoj torentoj. Tie oni tagnoktojn paŝadis en la neĝo por trovi ireblan vojon. La manĝaĵo finiĝis kaj la viroj certe estus pereintaj, se ne unu de niaj patroloj estus trovinta ilin. Ĉiutage venis tiaj novaĵoj pri fortostreĉoj, multe pli ol ĉiutage malfacilaj.

Kaj la tutan tempon ni ricevis sciigojn aŭ rakontis la fuĝantoj, kiel en Saltdalen furiozas bataloj, la brutaro estas buĉata, la hejmoj brulas, la vilaĝoj estas bombataj. Al la kuracisto en la ĉelima distrikto elĉerpiĝis necesaj kuraciloj. Li kontaktiĝis kun mi. Mi sukcesis irigi viron kun portajon transen al li.

Laŭlonge de la limo tondris grupoj da bombaeroplanoj, kanontondro aŭdiĝis supren al intermontaraj dometoj, unuopaj grupoj da soldatoj estis premiĝitaj trans la limon al sveda teritorio. Ilin kaptis la svedaj gardistoj kaj irigis al la marbordo. Angloj el karbominejoj kaj malseka klimato lamante venis trans la neĝmasivojn, havante frotvundojn kaj malbonajn frostdifektojn. Pli malfacila ol la izoleco en la ursolandoj ĉe la polusa cirklo certe estis al ili la malkapablo interkompreniĝi kun postenantoj kaj la loĝantoj. Kaj ke oni ne povis kontaktiĝi kun tiuj tie hejme.

Fariĝis dum tiuj rapidpasantaj printempaj semajnoj febroatmosfere en nia malvarmeta dezerto. La limoregiono ne plu estis la promesita lando de la izoleco kaj dezerteco. Tie nun vagis fremduloj, luktis kun naturo kaj ventoj por vivi, malvarmis, malsatis, ne rezignis. Tie ĉi oni renkontis la mirigan persiston kaj eltenkapablon, kiu enestas en ĉiu homo multe pli ol oni en la unua momento povus supozi.

Fine eksilentis pafoj en la kontraŭa valo. Oni kuraĝis iri malsupren de la intermontaj kabanaj al la trarabitaj bienoj. El Svedujo multaj reiris hejmen. La ventega ondo refluis kaj videbliĝis kiom ĝi disbatis. Bruligitaj hejmoj, disŝirita familia feliĉo, militmortintaj parencoj, bombita ĉiutage. Kaj dume la sopiro al la hejmo fariĝis ĉiam pli forta ĉe la finnoj en nia enloĝejo. Ili devis hejmen al Finnlando. Ili ja aŭdis, ke tie estas paco. Do tie devas esti loko ankaŭ al ili. Ili bone sciis ke ankaŭ iliaj hejmoj estas detruitaj, ke la laboro ĉe la minejoj kaj en la arbaroj ĉesis, ke la malriĉeco estas pli grava ol iam. Sed Finnlando estas la hejmo. Tio sufiĉas. Ili volis ekveturi kiel eble plej baldaŭ.

Laŭ tio kiel la formalajoj pretiĝis, grupo povis forlasi nin. Ili veturis per aŭtobuso al Arvidsjaur, kie la kantonistrinoj akceptis ilin. Per vagonaro ili

daŭrigis al Boden, kie afablaj homoj helpis ilin pluen. Sed kiam ili ekvojaĝis, ili estis ripozintaj, sanaj, kun sentruaj puraj vestoj kaj ankaŭ iom en la monujoj.

Mi kredas ke inter la plejmulto de ni en tiuj tagoj elkreskis eble ne elparolata penso kun forto de preĝo: Nur ne fuĝanto, nur ne senhejma . . .

*

Iom post iom ankaŭ la patrino de Veiko Johannes saniĝis, kaj laŭ tio kiom la sango alfluis al la flavpalaj vangoj kaj la laceco malaperis el siaj okuloj, ankaŭ kreskis ŝia sopiro al la hejmo. La naŭ infanoj montris de tio pli malmulte. Ili bone prosperis je siaj ludoj sur la korto, kie ili bruis kaj reciproke alvokis la kamaradojn en sia kantona lingvo. Nia opinio estis, ke la familio devus resti ankoraŭ iom da tempo, almenaŭ ĝis kam ni scios ĉu la edzo vivas aŭ ĉu li falis en la milito. Ni konsideris tro peza la ŝarĝon, kiun la edzino prenis al si, se ŝi jam vojaĝos hejmen, anime laca kaj korpe malforta. La hejmo ja estis bruligita, kaj la familio ne havis lokon, kien iri.

— Tamen jes! Ni havas la terpomkelon en la altaĵeto. Tie ni povos loĝi dum la somero, kaj ĝis tiam venos la vintro certe ekestos ia rimedo por havigi al ni tegmenton super la kapoj.

Antaŭ tia fido kaj persistega vivovolo ni kapitulacis. Anemia patrino kun naŭ nematuraj infanoj, kiu ne pretendas pli de la ĉiutago ol ke ŝi povas fondi sian esperon sur terkelon en altaĵeto, ŝi povas helpi al si.

Iun tagon ankaŭ la patrino, Veiko Johannes kaj la aliaj idoj estis enpakitaj en la aŭtobuson, pretaj por hejmenvojaĝo al sia amata, bruligita Salmijärvi. La patrino estis serioza. La infanoj ŝajne estis treege kontentaj en siaj novaj vestoj kaj forte tenis la manĝajpaketojn kaj kunligaĵojn, kiujn oni donacis al ili. Evidente estis ĝoje, ke oni ree veturos per aŭto.

Kapsalutante mi adiaŭis. Responde ili kapsalutis ridante per la tuta vizaĝo. Kiam mi estis forlasanta la aŭtobuson, iu frapis la vitron. Estis Veiko Johannes, kiu ekvidis min. Li premis sian malpintan mopsnazon kontraŭ la vitron kaj ridis per la tuta buŝo, dum la mallongaj dikaj fingroj tamburis per ĉiuj fortoj. Liaj dikaj vangoj brulfloris konkure kun la krispa hararo. La tuta vireto brilis de forto kaj sano kaj maltimanta vivovolo. Lia keruba vizaĝo antaŭ mi estis kiel flama promeso, ke renoviganta morgaŭo venos. Li estos unu el tiuj, kiuj rekonstruos, kion nia tempo detruis. Li scias nenion pri la malboneco de la homoj kaj ilia interluktado. Li nur senkonscie sentas, ke li volas esti kaj estos viro, kiu trabatos sin en la vivo. Kaj tiu viro, kune kun aliaj, faros ke ankoraŭfoje bonstato kaj floros ĉirkaŭ Salmijärvi.

En tiu momento li ŝajnis al mi hela elfo de tio, kio ne estas detruenda, kaj dum malhelaj tagoj li helpis al mi ne malesperante sed kun fido rigardi la tagon venontan.

Fino.

El la sveda Hj. Dahlén.

Tre interesa novaĵo.**D - R O D O R N E R**

Originalo en Esperanto de

Dro H. L. EGERRUP

La Kopenhaga "Ekstrabladet" skribas:

"La artefarita gravedigo hodiaŭ estas realo, kiun la medicina scienco prikalkulas, kaj el kiu ĝi multon atendas."

La aŭtoro, kuracisto kaj krome esperantisto de post multaj jaroj, per sia romano kreis belan kadron ĉirkaŭ la science interesa sed ĝenerale iom delikata temo.

Prezo kr. 6:50 + 15 % por imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 19071, Stockholm 19, Poŝtgiro 578

VERE VERDA URBO

Vigla intereso, bona laboro en Karlskoga.

La aŭtuna sezono de la "Aglo" komenciĝis per tre esperigaj signoj. Post la provlecionoj de d-ro F. Szilágyi, la kursoj ricevis ne malpli ol ĉ. 100 gelernantoj, kiuj diligente sekvas ankaŭ nun la instruadon. La publiko de tiuj 7 diversaj kursoj estas el ĉiu vidpunkto tre varia, ekzistas 3 infankursoj en du lernejoj, unu komenca kurso por la junularo de Ungdomsgården, unu komenca kurso por pliaĝuloj kaj funkcias du studrondoj por progresantoj. La gazetaro, kiel kutime en Karlskoga, kun granda atento raportis pri la kursarangoj, same kiel pri ĉiuj aliaj vivsignoj de la vigla klubo.

Samtempe kun la ekiro de la kursoj, la klubanaro komencis konstrui, masoni, raboti, pentri entute dum ĉ. 600 laborhoroj por ke komence de novembro la nova ejo de la klubo, moderna, bela salono kun propra, scenejeto estu preta. Dank' al la oferema laboro la ejo povis esti transdonata al la publiko kun kalendara precizeco la 4-an, resp. la 5-an de novembro, kiam okazis unue intima inaŭgura festo por la klubanoj kun la partopreno de la federacia sekretario Sune Ahlm. Krom lia parolado (kaj iom poste — lia apero kiel grandioza sorĉisto) F. Szilágyi, R. Lindahl kaj A. Bern faris paroladojn. La laste menciita esprimis la grandajn dankojn de la klubanoj al la iniciatanto kaj nelacigebla laborgvidanto, klubprezidanto Edvin Bonander, kiu reciprokis la dankojn kaj laŭdojn al ĉiuj bravuloj partoprenantaj en la laboro. La sekvan tagon estis la oficiala inaŭguro. Paroĥestro Folke Malmgren, membro de la klubo, solene transdonis la klubojn al sia celo. Kelkaj el la invititaj urbaj funkciuloj ĉeestis. Edvin Bonander transdonis tri specialajn ekzemplerojn de la Karlskoga libro unue al la urba reprezentanto, due al A. Leijder, kaj la trian al R. Lindahl. En la nomo de SEF Sune Ahlm parolis. La programon kompletigis la rememoroj de F. Szilágyi kaj la kolektiva kanto de Agloj, Aglidoj kaj eksteruloj. La aranĝo estis tre bona kaj la atmosfero tre agrabla. E. Bonander faris majstran parolejon, s-ino Maja Forsman pentris belan bildon kaj E. Eggemark donacis gastlibron al la klubo. Tablokantojn verkis E. Blanck kaj s-ino Leijder.

Kelkajn tagojn poste la junulara klubo "Aglido" havis sian apartan inauguran kafofeston.

La klubo dissendis leterojn al diversaj korporacioj kun klarigo pri la klubo kaj petis ekonomian subtenon por sia laboro. Kelkaj el la korporacioj kontribuis al la ekonomiaj rimedoj, inter ili unuavice la urbo, kiu ĵus decidis rekoni la gravecon de la esp. laboro, per 1000 kronoj, kiel subteno por la estontaj 5 jaroj.

Al tiu raporto apartenas la prelego, farita de dro Szilágyi en Ungdomsgården, la 18-an de oktobro, pri Hungarlando. La ĉ. 80 ĉeestantoj montris grandan intereson. La 24-an de novembro en Ungdomsgården okazis internacia vespero, kies programon ĉefe hungaraj rifuĝintinoj donis per bele prezentitaj kantoj kaj dancoj, sed ankaŭ la junulara kurso reprezentigis sin per sceno, parte svedlingva, parte esperanta, verkita de F. Szilágyi kaj aranĝita de s-ino A. Leijder. La plenplena salono longe aplaudis la tre lertajn junajn rolantojn, membrojn de la klubo Aglido kaj kursoj. La esperantistoj faris bonan propagandon.

Gesinjoroj Bonander donacis belan, valoran pokalon al la klubo, kiel migrantan premion al la plej fervoraj anoj. Pri la baldau okazonta decido pli malfrue.

LITERATURA MONDO VIVAS.

Literatura-Mondo-Eldonejo informas ĉiujn siajn amikojn kaj kunlaborantojn, ke la eldonejo rekomencis la funkciadon. Ĝoje ni informas, ke la redaktaro, s-anoj Kalocsay, Baghy, Totsche kaj aliaj fartas bone. Multe ni ĝojas tion same aŭdi de ĉiuj niaj reprezentantoj, abonantoj kaj amikoj. Provizora adreso de la administranto:

Béla Bleier,

Pestszentlőrincz, Hargitta-str. 10.

Alserĉu nin tuj, se la poŝta rilato tion ebligas!

EL FINNLANDO.

Esperanto bone marŝas antaŭen en nia lando post la somertendaro en Punkaharju. Dum tri monatoj ĉ. 80 novaj membroj jam aliĝis al IEL kaj en pli ol 20 lokoj estas delegitoj, komunikas ĉefdelegito, rektoro J. Vilkki, Somero.

Esperanto-Instituto dungis prelegiston por fari paroladojn en pluraj lokoj de la lando kaj por starigi studocirklojn.

Gazetaro. Estas planataj pluraj esperantaj fakoj, kiel ekz. en la gazeto "Uusi Päivä", "Rauta tieläinen" ktp Higiena revuo "Terveyden Ystävä" salutas siajn geamikojn, eksterlandajn natursanigistojn, per esperanta artikoleto. La redaktoro estas amiko de Esperanto.

Gazeto "Esperanto-Airut" ekeldonas nun ankaŭ hektografiitan "Semajnan Leteron", kies abonprezo en eksterlando estas 150 Fmk.

Novaj propagandiloj estas en verkado de magistro V. Setälä. Same nova eldono de la ŝlosileto, "kiu jam elĉerpiĝis tute".

Esperanto-Instituton de Finnlando prizorgas nun la konata pioniro sro Kaarlo Jokinen, Töölöntullikatu 7, A. 2., Helsinki.

ELPAROLU ZORGE.

Sub tiu rubriko nederlanda samideano skribas utilan plendon jene:

Kvankam la germanoj antaŭ kvar jaroj likvidis nian Federacion, mi tamen ne ĉesis esti esperantisto. Ne nur hejme, sed ankaŭ kun kelkaj federaciaj amikoj mi ofte parolis Esperanton. Post la liberigo de nia lando mi kontaktiĝis kun pli da esperantistoj, anoj de diversaj organizoj kaj sociaj rondoj. Mi ĝoje konstatis, ke neni plene forgesis la lingvon. Sed kun malĝojo mi konstatis — almenaŭ en la ĉefurbo — ke ilia elparolado tre suferis. Trafis min la fakto, ke multaj — ne nur el laboristaj rondoj — tre malzorge, kelkfoje eĉ vulgare elparolas Esperanton.

Tion oni nepre ŝanĝu! Prezentiĝas nun taŭga okazo: en diversaj sekcioj oni komencos "refreŝigajn kursojn". En tiuj kursoj oni nepre atentu la elparolon! Donu elparolajn ekzercojn! Aranĝu ekzercojn pri voĉlegado!

Esperanto estas belsona lingvo — sed nur se ni zorge ĝin elparolas!

El Laborista Esperantisto, Amsterdam.

NORVEGUJO. Nova redaktoro por Norvega Esperantisto (Esperantobladet) estas sro Alf Hasle. S-ino Liv Sandberg adiaŭas sian legantaron per la dua numero post la fino de la milito. Ni tre bedaŭras ke ŝia adiaŭo estas kaŭzita de ne bona sanstato. — Bonan ripozon kaj baldaŭan resanigon ni deziras al ŝi.

PASTRO J. B. KAO, la eminenta ĉina esperantisto, estas elektita de la ĉina registaro kiel membro de la Ĉina Helpa Komitato por militviktimoj. En tiu eco li per flugmaŝino vizitos 17 landojn en Sudameriko, kaj ni estas konvinkitaj ke li samtempe ĉie kaj ĉiam daŭrigos sian laboron por esperanto.

La forto de l' vero

Legolibro en formo de romano

"Temas pri disigo de du amantaj koroj per intrigulino, kiu amare pentas, tamen ne pli frue ol sur sia mortolito, sed ne tiel malfrue, ke la geamantoj post amaso da vojaĝoj aŭ erarvagadoj fine ne povus renkontiĝi kaj unuigi sian sorton — — —"

Prezo kr. 2.50 + 15 % por imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 19071, Stockholm 19. Poŝtgiro 578.

LA MORTO DE F-INO LIDJA ZAMENHOF.

En letero de s-ro Arszemuk, Polujo, al s-ro E. Malmgren li skribas i. a.: "En la lastaj tagoj antaŭ murigado kaj fermo de la hebrea kvartalo, mi venis al f-ino Zamenhof, kaj mi proponis al ŝi kaŝi sin ĉe mia pola familio. Sed tiu nobla virino rifuzis mian proponon savi sin dirante, ke mi kun mia familio povus perdi niajn vivojn, ĉar kiu kaŝas hebreon, tiu pereas mem kune kun trovita hebreo. — F-ino Zamenhof estis bruligita en la mortigejo por hebreoj en Treblinka, loko inter Varsovio kaj Bialystoko.

S-ro Gluchovski el Varsovio, instruisto, veterano de la esperantista movado en Polujo, estis bruligita kiel esperantisto, danĝera por Hitler, en mortigejo Oswiecim apud Krakow."

RADIO. Oni planas starigon de intereŭropa radiostaciario. La projekto antaŭvidas reton de 38 stacioj dismetitaj tra la tuta Eŭropo kaj disponantaj pri 11 ondolongejoj. La longaj ondoj estu rezervitaj ekskluzive por tiu eŭropa servo. Por solvi la lingvajn problemojn oni provos fari dissendon en diversaj lingvoj. Oni ankaŭ studos la eblecon uzi Basic English aŭ artefaritan lingvon.

Do, esperantistoj, prenu viajn plumojn kaj simplan poŝtkarton kaj skribu esperantlingve al: President of International Radio Maritime Committee, British Broadcasting Corporation, London, ke vi en la estonta reto deziras esperantan dissendon por ke vi kiel en 1938 povu ĉiutage aŭskulti esp-programon en via radioaparato.

TIDNINGSKURS I ESPERANTO págár i Signalen, organ för Svenska Järnvägsmannaförbundet. Kursen skall hålla tio lektioner och började i nr 45 av Signalen.

Dankon, Praha!

Ĉiusemajne — preskaŭ ĉiutage — niaj ĉeĥaj samideanoj dissendas Esperanto-programojn. Estas granda ĝuo aŭskulti. La mezlonga ondo 260 estas plej bone aŭskultebla: lunde kaj ĵaŭde je 22.20 (sed ofte komenĝas nur je 22.30).

Ilepto

(Internacia Ligo de Esperantista Poŝt kaj Telegraf Oficistaro) informis, ke ĝi denove funkcias. Ĉiuj svedaj poŝt- kaj telegraf-oficistoj esperantistaj estas petataj interrilati kun la ĝenerala sekretario de ILEPTO, s-ro Robert Filiâtre, Acheres (S et O), Francujo. Delegito por Svedujo estas s-ro T. Julin, Nytorrgsgatan 15, ö. g. 4 tr., Stockholm Sö.

Skoltista mondjamboreo.

En 1947 okazos en Francujo mondjamboreo. Kiel ejon oni elektis vastan kampejon apud la rivero Seine, 70 km de Paris. 35.000 skoltoj 14- ĝis 17-jaraj povos partopreni. La kunveno de la esperantistaj skoltoj okazos la unuan tagon de la jamboreo.

La skoltoj kaj esperanto.

Ĉiu skolt-gvidanto bonvolu instigi la skoltojn jam nun komenci lerni esperanton por havi eblecon partopreni la Skoltistan mondjamboreon en Parizo 1947. Tiuj skoltoj, kiuj povas paroli esperante, havas grandan favoron, ĉar ili havos eblecon interparoli kun esperantistoj el plej diversaj nacioj. El la plej multaj landoj venos nome esperanto-parolantaj skoltoj.

Disvastigu tiun ĉi alvokon al ĉiuj viaj konatoj.

Esperanto-resumoj de sciencaj verkoj.

En la serio "Informoj de la zoologia muzeo, Oslo" nia samideano C. Støp-Bowitz eldonis du sciencajn verkojn pri "La norvegaj Ofelledoj" kaj "La Skalibregmedoj de Norvegujo". Temas pri specoj de marvermoj vivantaj en la marfundo. La du verkoj, skribitaj en la franca lingvo enhavas tre bonajn resumojn en Esperanto.

Niaj nunaj kristnaskaj salutoj kaj novjaraj bondeziroj atingas pli malproksimen, kiel dum la pasintaj jaroj. Al ĉiu amiko: harmonian feston kaj feliĉan novan jaron: Rose kaj Ferenc Szilágyi, Tredje Vilag. 26 ö. g., B o r å s.

Al ĉiuj legantoj de La Espero ni sendas bondezirojn por Kristfestoj kaj Novjaro. R e d.

Gojan kristnaskon kaj veran pacon deziras al geamikaro Tiberiu kaj Dorica Morariu. Stockholm Tegelbacken dec. 1945.

PLENA VORTARO. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) planas eldoni Plena Vortaro kaj alvokas jene: Por ke la tria eldono superu la duan, konigu al ni la mankojn, la erarojn kaj la malklaraĵojn, kiujn vi konstatis kaj sendu al SAT 67 av. Gambetta, Paris 20. Skribu sur nur unu flanko de la folio.

Krucvortenigmo.

1		2		3		4		5
		6						
7	8					9	10	
11								
12		13				14		15
		16						
17						18		

HORIZONTALALE:

- 1. Utiligo.
- 4. Demanda pronomo.
- 6. Veni returne al la deira loko.
- 7. La duoble kvara.
- 9. Inklino al persono aŭ ideo.
- 11. Plata malfermebla skatoleto ordinare portata per ĉeno ĉe la kolo.
- 12. Demanda adverbo.
- 14. Prepozicio esprimanta celon, destinton, aĉetobjekton k. s.
- 16. Ordigi la harojn.
- 17. Konsenta interjekcio.
- 18. Amase.

VERTIKALE:

- 1. Vazo aŭ kesto, kiu entenas tutan objekton.
- 2. Brila, valora.
- 3. Negativa doktrino nanta ĉiun ajn kredon kaj malakceptanta ĉiun ajn regadon.
- 4. Ekkria kaj demanda adjektivo.
- 5. Elektra unuo.
- 8. Rigardi ion kiel veran, ne postulante pruvojn.
- 10. Malesto de tio, kion oni bezonas.
- 12. Kunliganta konjunkcio.
- 13. Iama estinta, ne plu estanta.
- 14. Sincere respektplena al Dio.
- 15. Denove.

Kombinita de K. J. Moberg.

Por solvoj venintaj antaŭ la fino de decembro la red. donas libro-premion al la du plej bonaj.

MALGRANDA REVUO. Nova nro aperos en la komenco de decembro. Enhavo: Esperanto kaj lingvosento, de S. Engholm — Nederlando dum la milito, de W. Veldman — Lukto kaj enmeto, de V. der Stempel — Kiel bestoj kondutas, de P. Th. Justesen — Sciencistoj, diplomatoj kaj demokratoj, de St. Fink-Jensen — Scienco kaj esperanto, de dro A. Mildwurf.

Prezo: 1 kr., je mendo de minimume 10 ekz. 0,80 kr. (inkl. afrankon). Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 int. respondkuponoj. Redaktoro-eldonanto: S. Engholm, Skolg. 9, Ludvika. Poŝtĉeka konto 23 80 26.

SEIF Kolono

LA KASISTO RAPORTAS.

Klubaj membroj.

La nuna jaro baldaŭ estos finita. Post kontrolo mi bedaŭrinde trovis ke 19 kluboj tute ne ensendis kotizojn al SEF por 1945, nome la kluboj en Alingsås, Boden, Faringe, Hallstahammar, Halmstad, Herrljunga, Hudiksvall, Lidköping, Malmköping, Nybro, Orrefors, Sala, Strängnäs, Strömsnäsbruk, Sundsvall, Svensbro-Borgunda, Tibro, Uddevalla kaj Uppsala.

La jenaj kluboj raportis pri siaj membroj kaj ensendis kotizojn:

Borlänge (15 membroj), Borås (25), Eksjö (9), Eskilstuna (20), Eslöv (9), Falköping (13), Falun (8), Gävle (15), Göteborg (24), Hallsberg (15), Hishult (7), Hälsingborg (20), Härnösand (7), Jönköping (13), Karlskoga (43), Karlstad (5), Kristianstad (17), Krylbo (11), Kumla (14), Lund (9), Malmö (101), Motala (11), Norrköping (46), Nynäshamn (8), Skara (8), Skövde (34), Smedjebacken (11), Sollefteå (13), Stockholm (100), Surte (12), Söderhamn (3), Tierp (6), Tranås (8), La Fajrero, Uddevalla (14), Ulricehamn (9), Vetlanda (7), Vimmerby (6), Västerås (9), Ystad (10), Örebro (32).

Entute 747 membroj en 40 kluboj. (1944: 898 membroj en 50 kluboj). Espereble la supre nomitaj 19 kluboj plej baldaŭ plibonigos la statistikon.

Rektaj membroj.

La nombro de rektaj membroj kreskis de 112 en 1944 ĝis 154 en 1945. Espereble tiu kresko daŭrigos tiel ke ĉiu leganto de SET kiu ne estas membro de SEF-klubo fariĝos rekta membro Tial uzu la enpagilon kunmetitan kaj ensendu 7:50 al poŝtĉeka konto 20 12.

Propaganda kaso.

Post la 1.6. envenis la sekvantaj donacoj: F. Turner, Hackefors, 17:50, N. Olsson, Höör, 10:—, J. Wallberg, Torsåker, 5:50, A. Harnell, Bengtsfors, 4:25, Selma Persson, Lerbäck, 4:—, A. Andersson, Järvsö, 4:75.

Amikaro de SEF.

Ĝis nun envenis proksimume 1.900:— por la konto supre nomita. La mono estas uzita ĉefe por 4 aferoj, nome:

1. La propaganda afiŝo kr. 575:—
2. " " folio " 545:—
3. Kontribuo al Eldona Societo por la prop. n-ro de SET " 150:—
4. Paperfolioj senditaj al Francujo " 425:—

Stockholm la 24an de nov. 1945.

B. S k a n t z.

RADIO

Vi ricevis cirkuleron per kiu ni informas vin pri la nova provo venki la kontraŭstaron de la sveda radio rilate akcepton de esperanto kiel fiksa programpunkto. Ni esperas ke vi ĉiuj faros vian devon kaj sendos al ni la petitajn adresojn por ke la afero povu komenciĝi kiel eble plej baldaŭ.

Kiam vi skribas al viaj eksterlandaj amikoj, ne forgesu peti ilin sendi karton aŭ letereton al Radiotjänst, Stockholm, kun peto pri esperantoprogramoj. Kompreneble vi mem ĉiam faras tiun servon al viaj eksterlandaj amikoj skribante al la radiostacioj en ilia lando. Eta ago kiu kostas al vi nur 10 minutojn, poŝtkarton kaj 20-oeran poŝtmarkon.

PRAHA. Ĉeĥoslovakio ŝanĝis mezan kaj mallongan ondon kaj sendas nun l u n d e kaj j a ŭ d e sur meza ondo 260 m kaj krome sur longa ondo 1571 m je la 22.20 horo. (Kiam mi provaŭskultis la 22/11 la programo tamen ne komencis antaŭ ol 22.30 h. Virina voĉo raportis pri mondkongreso de studentoj kaj pri rusa filmaktorino, kiu vizitis Praha-on. Sufiĉe bone aŭskultebla.) Ĉiutage PRAHA sendas sur la nova mallonga ondo 49.92 m je la 23.00 horo, sed tiun mi ankoraŭ ne sukcesis kapti.

Amikaro de SEF

ricevis UNU novan membron de post la pasinta ra-

Till Bokens dag.

Nyheter och under kriget försvunna böcker som åter inkommit:

Vivo de Zamenhof. Av esperantorörelsens store vältalare Dr **Edmond Privat**. Denna ypperliga bok, som intimt skildrar vår "mästares" liv och verk och som varit omöjlig att anskaffa till alla dem, som under kriget velat ha den, har nu inkommit på nytt. Illustrerad. Kartonnerad. Pris kr. 5:50.

Aeronaŭtika Terminaro

Armea Terminaro

Terminaro por infan-ludoj

Muzika Terminaro

Radio-Terminaro

Prezo por ĉiuj kvin kr. 4:50, aparta vol. 1 kr.

Ĉu vi scias? La libreto enhavas 200 demandojn, kiuj interesas esperantistojn. Provu — la ĝustaj respondoj troviĝas en la dua parto de la libro. Ĝi igas vin pensi. Prezo kr. 1:—.

Bibeln, inbunden i klotband, gott papper. 8:—.

Nya Testamentet, inbundet i klotband. 2:—.

D:o, d:o, inb. i läderklot. Oxford India-papper med guldsnitt. 5:50.

D:o, d:o, inb. i svart mjukt läderband med helt guldsnitt, finaste Oxford-India-papper. 7:—.

The Gospel in many tongues (Evangeliet på många tungomål). Innehåller prov på 692 språk, däribland esperanto. 178 sid. 2:50.

**Till ovanstående priser kommer 15 %
för oms. och porto**

Fack 19071, Stockholm 19, Postgiro 578

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

porto: Harry Nilsson, Malmö. El tri urboj B—s, S—a kaj U—a ni malgraŭ promesoj ankoraŭ ne ricevis informon pri la rezultoj. Sed versaĵne ili same kiel la plej multaj aliaj volis atendi por surprizi nin per membreco kiel kristnaska donaco. Ni ĝojas kaj atendas la kristnaskan koboldon. Li ja kutimas veni al tiaj infanoj, kiuj sin bone kondukis dum la jaro!

Koresponda centro.

Multaj eksterlandaj geamikoj sendis al ni leterojn petante ke ni provu havigi al ili korespondantojn. Tial ni nun atendas, ke vi sendu al nia Koresponda Centro viajn afrankitajn sed senadresajn leterojn por ke ni povu elekti interesan amikon aŭ amikino por vi.

Nova klubo.

La Roko fondiĝis en Östersund inter gimnazianoj kaj intencas aliĝi al SEF. Tio estas bona signo, kiam junuloj mem decidas fondi klubon por povi pli efike labori por nia lingvo. Ankaŭ de kelkaj aliaj kluboj, ankoraŭ ne aliĝintaj al SEF, ni ricevis vivsignojn kaj espereble ili nun spertis, ke aliĝo al SEF ne nur estas necesa sed ankaŭ por la klubo tre valora. Ju pli da kluboj kaj membroj SEF havos, des pli forta ĝi estos kaj des pli vastan propagandon ĝi povas entrepreni por disvastigi nian lingvon. Imagu nur se ĉiuj, kiuj iam studis esperanton, ankaŭ estus membroj de nia federacio — certe la nombro de studentoj estas proksime al 100.000 en nia lando — tio signifus ke nia lingvo jam de longe estus deviga temo en la lernejoj, ke ni ĉiutage povus aŭskulti esperanton en radio, jes entute ĝi signifus ke la mondo akceptis esperanton kiel solan internacian lingvon! Nu, revado ĉiam estas facila. Sed, se ni ĉiuj kunlaboras intense kaj efike, la revo povos esti realigata. Ĉu ni promesu unu al la alia fari nian plej bonan laboron por esperanto dum 1946? J e s ! S a m.

*

AGRABLAN KRISTNASKON kaj PROSPERPLENAN NOVAN JARON

deziras al ĉiuj siaj membroj kaj alilandaj samideanoj SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO.

SVEDA KRONIKO

Grupo Esperantista de STOCKHOLM. La unua kunveno en la monato oktobro, la 3-a, estis samtempe ĝia granda okazaĵo. S-ino Kaminska el Varsovio parolis pri siaj travivaĵoj en la koncentrejoj de Auschwitz kaj Ravensbrück. Kiam Gestapo forprenis ŝin el la hejmo, ŝi timis esti mortpafita, sed kio venis estis pli terura. Kiam en 1943 la mallibereja pordo fermiĝis post ŝi, oni tuj enpelis la kaptitojn en vagonon kun sangmakulita planko, kiu kondukis ilin al Auschwitz. Tie regis malsato, mizero, malsano, la gardistoj batis, insultis kaj mokis: "Vi venis por morti". En la loĝejo oni povis nur kuŝi, ne rekte sidi, tiel ke oni tuttage havis kurbitan dorson, abundis puloj kaj pedikoj. Kvindekbata puno oftis. Amaso mortis. Inter la internacie kunmetita kaptitaro estis ankaŭ krimuloj, tiuj rajtis ludi la plej gravan rolon. Pro ĉio oni devis batali. La manĝaĵo estis tre malbona, i. a. oni ricevis hundajon. Multaj ŝmiris la vizaĝon ŝajnigante sanon por ne esti gasumataj. La elektitoj por gasumo venis al mortbarako, kie ili devis resti dum 2 semajnoj enfermitaj. Disvastiĝis tifa epidemio, ĉevalskarabo kaj aliaj malsanoj. La aeron plenigis la odoro de bruligitaj korpoj. En majo 1944 miloj da homoj estis entransportataj por gasumo, infanojn oni ŝovelis vivajn en la fornojn. En oktobro 1944 ŝi estis sendita al Ravensbrück, kie ripetigis la samaj teruraĵoj, ĉie estis videblaj kadavroj kaj oni sur veturilojn kunĵetis vivajn kaj malvivajn kune. Kiam fine subite venis la savo per la Sveda Ruĝa Kruco, oni longe ne povis kredi, ke estas vero.

Siajn travivaĵojn s-ino K. eldonis en kajero, aĉetebla ĉe la prez. de la klubo s-ro S. Håkansson, Stockholm Ban. Pr. 1 kr.

La 10-an s-ro Malmgren montris laŭ ricevitaĵoj leteroj la novan reviviĝon en Esperantujo. La 17-an s-ro Håkansson aranĝis lingvajn ekzercojn laŭ "Lingvaj Respondoj" de d-ro Zamenhof. La 24-an ni havis konkurson de nepreparitaj parolantoj. La 31-an okazis konkurso demanda, la demandoj estis lerte kunmetitaj de s-ro Håkansson.

B.

Ludvespero por la esperantaj infanoj. En Göteborg oni la 14-an de novembro aranĝis ludvesperon por tiuj infanoj, kiuj partoprenis esperantajn kursojn. La ludvespero okazis en Nordhemsskolan sub ĉefa gvido de s-ro Vilhelm Johansson.

Esperantoklubben i FALUN bildades den 17 december 1905 och blev sedan en av de livligaste i landet och skulle alltså kunna fira sitt 40-årsjubileum.

VETLANDA Esperantoklubb. La 5 de nov. startis novkomencanta kurso. Gvidanto estas s-ro Gunnar Karlsson. En la kurso partoprenas 10 personoj. Ejo estas Popola domo kaj tago por kunvenoj estas ĉiu lundo je horo 19.30. M-m.

FLANDRA ESPERANTISTO, organo de Flandra Esperanto-Instituto en Brussel, sendis siajn maj- kaj junio-numerojn preskaŭ tute flandrolingvaj. — Grandformata, 4-paĝa. La nun veninta okt-nro enhavas multajn esp-artikolojn.

B. LAVÉN, Örebro, 80-jara.

Sian 80 jaron s-ro B. Lovén atingos 31. dec. Li estas fervora samideano, kiu spite la aĝon ankoraŭ vigle partoprenas en la laboro de nia movado. Nur tre urĝa afero povas okazigi lian foreston de niaj kunvenoj. Siatepe li estis prezidanto de la Örebroa societo kaj de ĝia distrikto. Ekonomie bonstata li ĉiam pretas helpi. Lia fortika fisiko restigis lin vigla ĝis envio. Pro siaj multaj vizitoj ĉe la SEF-aj jarkunvenoj li estas bone konata, kaj certe multaj volas je la festotago gratuli lin, kaj al ili kore aliĝas "La Espero" kaj Örebroa societo.

P h. J — n.

KORESPONDADO.

Sro J. M. Ventura Cortes, Arrabal de S. António 124, Valls, Tarragona, Hispanujo.

Sro Cahir Gallinagh, 15 Dehi Parade, Belfast, Irlando.

Sro Alan D. Corré, 46 Rutland Park Mansions, Willexter Green, London NW 2 (19-jara).

Sro Roland W. Ruff, Route 2, Box 233, St. Albano, West Virginio, USA (37-jara).

Sro G. Ström, Kungälvsgatan 4, Göteborg, Svedujo (33-jara).

Sro Dominiko Perez (chez Mme Ruffie), rue des Rentiers, Tarascon, S. Ariege, Francio.

Sro Roger Colney, 15 rue Pasteur, Lyon 7, Francio.

Sro André Hervouet, Avenue Jean Bouin, Nantes, Loire-Inf, Francio.

Sro E. R. Holt, c/o Bed Tws, H. M. Naval Base, Alexandria, Egiptujo.

Sro P. Rem, Fredrikslaan E 114, Heiloo, Nederlando (poŝtovicisto).

Sro E. Keiser, Hubacherweg 6, Liebefeld bei Bern, Svisujo (fervoĵisto).

Sro K. van der Wal, Kielsterstraat 30, Hoogezand, Nederlando.

Sro Chr. Cornax, Hugo de Grootstraat 142, Delft, Nederlando (komenc.).

Sro Fred Ples, Osdorperweg 944, Halfweg, Nederlando.

Sro C. W. Tegeler, Hoofdweg 17, Niemwerkerk YZH, Nederlando.

Sro C.W. van Altena, Norderspoorsingel 22 b, Groningen, Nederlando.

Sro T. Puister, Oliemuldersweg 58, Groningen, Nederlando.

Sro J. H. Holding, 2647 W. Adams St, Chicago, Ill. USA. Afranku filatele k aerpoŝte. Nur kun eksterusonuloj.

Sro-J. Govaert, 64 Rue Bon Secours, Compiègne, Oise, Francio.

Sro F M. Cave, Pomona, Queensland, Aŭstralio (interŝ. PM k monerojn).

Sro Gilbert Bruyned, Vlamingdam 121, Brugge, Belgujo (kun stud. pri televizio).

F-ino Marie-Louise Senave, Vestingstraat 44, s-ta Kruco, Brugge, Belgujo (interŝ. il. PK).

F-ino Rose-Anne Roose, Gvido Gezellelaan 15, Brugge, Belgujo (interŝ. il. PK).

S-ro Stefan Rostoniee, Cegielniana 30—11, Łódź (Polen).

S-ro Isai Dratwer, Szeroka 5, Warszawa-Praga (Polen) deziras korespondi, kaj danke ricevos malnovajn librojn kaj gazetojn esperantajn.

S-ro Jozefo Arszenik, Pomosze Zahochue, Trebtow (Polujo) deziras korespondi kaj danke akceptos esperantistajn librojn, gazetojn. Li ankaŭ volas kontakti kun filatelistoj.

Nov-Zelando. Multaj korespondemuloj troviĝas en Nov-Zelando laŭ listo, kiu troviĝas ĉe SEF. Kiuj deziras korespondi kun ili sin anoncu ĉe Koresponda Centro de SEF.

S-ro Raymond G. Richardson, B/M GRAN, London, W. C. 1, Anglujo, (57-jara eksfabrikisto kun intereso por medicinaj kaj sciencaj libroj).

Mi deziras aĉeti jenajn al mi mankantajn numerojn de la Sveda Esperanto-Gazeto. 1930: 11, 12; 1931: 2, 10, 12; 1932: 1, 2, 5; 1933: 1, 7, 8; 1934: 5, 12; 1935: 3, 8, 9, 10; 1936: 4; 1937: 2. Kiu povas helpi min havigi ilin? Birger Gerdman, Sibyllegatan 83, Stockholm.

AMERICAN ESPERANTIST venis kun duobla numero por sep-okt 1945. Tre eleganta kaj multampleksa kajero, duonparte angla. Ĝi komencas per represo de la artikolo de profesoro Björn Collinder pri Världsspråksproblemet (The World Language Problem). Gvidanta artikolo estas tre necesa kritiko kontraŭ la instituto IALA, International Auxiliary Language Association, kiu post multjara laboro kiel konsilanto je lingvaj demandoj nun lasas sian objektivan rolon kaj provas prezenti novan helplingvon "Schematic E" kaj "Schematic K", unu el ili kun fonetika literumo. Kiu ni ne scias — kaj ne trovas necese ekscii.

Till våra ombud.

Vi behöva en absolut uppgift omedelbart och i alla fall senast efter Bokens Dag huru många ex. av LA FINO, som ev. återstå. Förlaget har nämligen endast ett fåtal kvar.

Vi bedja även ombuden att omedelbart returnera ev. osålda ex. av LA MALJUNULO. Den är nämligen slutsåld på förlaget.

Förlagsföreningen Esperanto.

BÖCKER UTSÄLJES extra billigt!

1000-tals böcker alla slag i nya ex. Lämpligaste julpresenter. — Kataloger gratis.

CARL JOHANSSON, Postfack, ANEBY

Svenska Esperanto-Tidningen**La Espero**

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Nytorgsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98.

Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:—. Lösnummer 0:35.

Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

ESPERANTO INTERNACIA

ekde Januaro 1946 aperos ĉiumonate, kutime 16-paĝa kun kolora kovrilo.

Ĉiuspecaj informoj pri Esperantujo, legaĵoj, enigmoj, korespondanoncoj.

LA JARLIBRO

La 1-a parto, kutime en Aprilo, kun la Delegitaro, Landaj Raportoj, oficialaj informoj.

La 2-a parto, kutime en Oktobro, kun ŝanĝoj en la Delegitaro kaj, ni esperas, kiel kutime kun nova fakvortaro.

Subtenu viajn organizaĵojn, naciajn kaj internaciajn, kaj mem profitu el la presaj informoj.

Kotizoj 1946

MJ 3.50 kr. ricevas la Jarlibron

MA 9 kr. ricevas la Jarlibron kaj la gazeton E. I.

MS 18 kr. ricevas kiel MA, sed pagas pli altan kotizon por eĉ pli subteni al I.E.L.

Patrono 90 kr. ricevas kiel MA, sed vere prince subtenas la movadon.

Pageblaj al la Ĉefdelegito

S-ro K. Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtekkonto 15 12 88.

YTONG

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

Bygg för framtiden ett högisolerande stenhus till samma eller lägre pris än ett trähus.

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet**